

La Esperanto-Gironde Informilo



JUNIO 2017

N° 151

Bonajn feriojn!



ESPERANTO-GIRONDE

2an de aprilo 2017

en CENON

Ceestas: Elvezio Canonica, Marie-Thé Guillaume, Monique Dussenty, Morine Stride, Peio Labbé, Joël Lajus, Marcelo Redoulez, Claudine Pomiról

Senkulpiĝis: Yannick kaj Janine Dumoulin, Jean-Seb Brilleaud, Martine Edelbloude

Komence, Morine, Monique kaj Elvezio interŝanĝas pri ŝanĝo kaj transdono de la kontoj. Necesas rendevui en la poŝtoŝeĵo en Kreon' por oficialigi kaj registri la rajton suskribi nome de la asocio.

Elvezio enkondukas la kunvenon. Unue denove dankas Janine pro la bela laboro okaze de la 150a numero de LEGI, kaj dankas ankaŭ ĉiujn, kiuj kontribuis.

Li donas novaĵon pri Jean-Seb: li pli bone fartas kaj nun denove kapablas ŝofori sed Annie momente ne plu pro akcidento kaj problemo al genuo.

Unua punkto: LEGU _ LEGI _ LOGO: Diskuto pri nova logo

Pro manko da tempo kaj neeble firme decidi kaj voĉdoni dum antaŭa komuna kunveno, Janine ne povis jam enmeti ĝin sur la frontpaĝo de la 150a numero.

Ĉu ni volas de nun enmeti la novan logon en la frontpaĝon de LEGI?

Marcelo proponas samtempe ŝanĝi tutan aspekton de la frontpaĝo, kun apero de nova desegno (gejunuloj legante kaj la terĝlobo) apud la logo anstataŭ la nuna bildo.

Ni devas ankaŭ listigi la devigajn elementojn, kiuj aperos: LEGI la Esperanto -Gironde Informilo (kaj ni ŝanĝos ĉiufoje daton, numeron...).

Ĉiesvoĉe adoptite.



Alia punkto: Kurso en Universitato. Ĝi okazas merkrede de la 17a30 ĝis la 19a: Ok lernantoj, kiuj eble venontan jaron volas daŭrigi. Se jes, ĉu du niveloj antaŭvideblaj venontan jaron?

Elvezio de nun traktas kun respondeculoj en la universitato por ke kursoj de esperanto estu «oficiale» registritaj kiel ĉiuj aliaj kursoj pri lingvoj. Nefacile. Tamen se jesa permeso sufiĉe frue venas, li deziras, ke kurso de esperanto komenciĝu jam de septembro aŭ oktobro.

Restas nur du merkredoj antaŭ la fino de la semestro.

La 12an de aprilo, okazos la lasta kurso.

Programo de tiu aparta tempo: Atentu! nur unu horo kaj duono disponebla de la 17a30 ĝis la 19a:

- prezento de biografio de Zamenhof transdonita de Janine
- prezento de filmo pri Esperanto (kelkaj sekvencoj)
- aŭskulti kantojn (KD), tiucele preni kelkajn el nia ŝranko, sendi tekstojn al Elvezio: *La Rozo + Tuj la Kompanar' + Kiam restas am' nur*

- Morine proponas kanti.

- Eblas favore preze (5,00€) vendi KD de Moriza kaj disdoni savitajn vinilkosmo-KD-ojn.

- Jean-Seb ankaŭ pretas veni.

- Kiu alia? Rendezuo sur la parkejo bât.

BCD je la 17:00. Salono MOD005 (modulaire).

- Marcelo ne povas respondi nun pro atendo de deviga laborkunveno sam-momente.


- Poste komuna manĝo (pikniko).

La 16an de marto estis Lingvo-Festo en la universitato kun budo por esperanto. Deĵoris Marie-Thé kaj Jean Seb.

Alia projekto: Fari ekspozicion pri Zamenhof en la halo (akceptejo) de la universitato en septembro aŭ oktobro. Evidente nepras peti oficialan permeson...

Tiuj projekto kaj demando estas strikte ligitaj al tiu pri la kursoj.

Ĉu Esperanto en la universitata biblioteko? Se oficiala kurso... do necesas kontrakto; profesoro ne povas esti libervola sen salajro. Ĉio, nepre devas esti oficialaĵo.



Alia demando: Propono de Jean-Seb; ĉu ni konsentas aĉeti «EDE-veŝtojn» Demokratio en Eŭropo (10€) por subteni?... Estos petita de li, ke li informiĝu pri la aĉetado (kie kaj kiel...)

Nepra bezono: inventari, katalogi kaj nombri la materialon en niaj ŝrankoj por prezenti Esperanton. Joël memorigas nin, ke parto de tiu materialo estas eksmoda. Necesas selekti kaj modernigi ekspozicio-materialon...

Morine proponas presigi novstilan banderolon kaj disdonotajn legosignojn. Bona kaj bela laboro por tiuj, kiuj pretas engaĝiĝi ...

Estas memorigite, ke tiu projekto por ordigi la ŝrankojn estis jam planita antaŭ kelkaj jaroj. Datoj (lunde) estis elektitaj kaj anoncitur partoprenantoj... lastminute mankis. Do nenio delonge okazis.

Ni fiksu la 12an de junio por tion fari. Povas okazi dum tuta tago se la salono estas libera. Oni demandas. Marcelo laboras matene kaj povos ĉeesti nur posttagmeze.

Informoj: Okazas kurso de esperanto en ENS, (rue d'Ulm, Paris). Instruas Jesper Jacobsen, profesoro pri teoria fiziko.



Jesper Jacobsen

Guy Camy, Maurice Juy, Alexandre André estis akceptitaj en Parizo la 14-an de februaro ĉe la DGESCO (Direction Générale de l'Enseignement Scolaire) por peti oficialan subtenon por la enkonduko de Esperanto en la lernejoj (elementaj, mezlernejoj kaj liceoj).

La urbo Périgueux estas «ville pilote» (eksperimenta urbo) por lernado de «Espéranto au bac». Tri liceoj partoprenas en tiu projekto, kun tri intervenantoj: Claude Labetaa, Maurice Juy, Jose Soria.

Joël sciigas al ni, ke en Libourne, li petis informon de ĝemelaj urboj en Germanio - Schöndorf - kaj Hispanio – Logroño - por scii ĉu grupo da esperantis-toj aktivas en la ĝemeligitaj urboj. Post esplorado ne estas esperanto grupo en tiuj urboj.

Alia propono de Joël: Ni povus provizi per libroj france skribitaj kelkajn bibliotekojn, kiuj konsentus informi pri Esperanto. Ekzemple: Masson/Centassi: *Babel*; Piron: *Le défi des langues*. Tiucele nia grupo aĉetus kelkajn librojn. Sed atentu! En bibliotekoj, libroj, kiujn oni ne sufiĉe pruntedonas ne daŭre restas videblaj. Esplorenda afero.

Kajto, kvarope



Alia punkto: Kajto en nia regiono en aŭgusto. Pluraj el ni esploris diversloke diversajn eblecojn. La respondoj estas negativaj, ĉar la programoj estas jam kompletaj por 2017 aŭ salonoj estas fermitaj dum tiu tempo. Plie dum somero, tro da esperantistoj forestos. Bedaŭrinde ni devas rezigni pri koncerto de Kajto ĉe ni en aŭgusto.

Tamen pluraj organizantoj favorus por koncerto en 2018. Tiucele ili jam kolektas proponojn por elekti la programon por la venonta kultursezono. Elektro de programo verŝajne okazos baldaŭ antaŭ junio. Ni petos de Kajto, ĉu ili pretas veni venontan jaron. Ĉu en printempo? Kiom da tagoj?

(Pluraj koncertoj en Ĝirondio, en kiu(j) lingvo(j), unu nur en esperanto!) Kaj ĉu ili povas de nun anonci datojn? Marcelo pretas skribi al Kajto por klarigi la aferon.

Alia demando: Kio okazas nun pri la projekto de KD de Famo? La projekto estas survoje kaj daŭras. Famo dankas la grupon pro konsento de uzado de la nomo «La Kompanoj» kaj propono de subteno. Nun Famo traktas kun diversaj instancoj por havi oficialajn rajtojn registri la kantojn. Longa kaj ne simpla laboro. Pro tio, dato por surbendigi ne estas ankoraŭ elektita.

Venonta kunveno: La 21a de majo estis jam elektita dum antaŭa kunveno (la 8an de januaro). La kunveno devus okazi en Gujan Mestras. Intertempe la grupo en Gujan informis, ke ne eblos. La 21a de majo tamen validas sed la kunveno okazos en Kreon' ĉe Morine je la 10a30. Ni iros en Gujan pli poste alian fojon.

Fine de la kunveno je la 13a15.

Post komuna manĝo (abunda kaj bona kiel kutime) Marcelo projekcias bildaron pri floroj. Tiam ni iom laboris en Esperanto. Ni laŭte legis kaj tradukis tekstetojn, kaj ankaŭ aŭskultis kantojn. Aparte unu de Olivier Tzaut. Okazo por memori al la amikoj, kiuj delonge estas en la grupo, ke iufoje venis en Palmer tiu kantisto (el svislando). Kaj tre amuze, ke tio okazis en la salono kie ni estas hodiaŭ. Tio estas sub la tegmento. Ĉar pro organizado de «parcours du cœur» en la parko oni ne rajtis uzis salonon en la teretaĝo de la kastelo.

Iom post la 16a, ni adiaŭis. Ni pasigis agrablan momenton en simpatia amikeca rondo.

Claudine

ZAMENHOF-FESTO EN UNIVERSITATO BORDEAUX-MONTAIGNE

La 12-an de aprilo, okaze de la lasta kurso, Elvezio organizis festeton en la universitato por celebri la 100an datrevenon de la forpaso de Zamenhof. Ni disdonis etan sintezon de lia vivo, kaj spektis kelkajn ĉapitrojn de la filmo de D. Gauthier. Poste, Morine kantis *Kiam restas am' nur, La rozo, Tuj la kompanar'*, kaj ni ĉiuj kunkantis. La studentoj legis kelkajn anekdotojn en Esperanto: kelkfoje ili ridegis, tio signifis ke ili bone komprenis. Poste, la gardisto forpelis nin, ĉar estis tempo fermi la salonon, kaj ni instaliĝis ekstere por pikniki.

Ni estis entute 13 personoj, 6 anoj de *Espéranto-Gironde* kaj 6 gelernantoj kun Marie-Thé kiu apartenas al ambaŭ grupoj. Ni manĝis porkaĵojn kaj kukojn kaj trinkis bieron, cidron, vinon, gasan akvon kaj fruktosukon. Estis tre bona etoso.

Poste ni diskutis pri la libertempoj kaj la projektoj de la gelernantoj. La pikniko finiĝis je la 9a vespere.

Elvezio



Ĝoja etoso dum la pikniko!

ESPERANTO-GIRONDE KUNVENO DE LA 21a de MAJO EN CREON

Ceestas: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Thérèse Cayatte, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Bruno Ferré, Peio Labbé, Aurora Lopez-Rodriguez, Claudine Pomiro, Marcelo Redoulez, Morine Stride

Senkulpigataj: Marie-Thérèse Guillaume, Ge-Jagueneau, Ge-Sarlandie

Elvezio dankas al Morine kaj Peio pro la gastigado.

- Laŭ la protokolo de la kunveno de la 2a de aprilo, estas starigita la demando pri la ŝanĝo aŭ ne de nia logotipo LEGI. Ĉiuj konsentas pri la ŝanĝo. Do la venonta numero aperos kun la nova logotipo. Marcelo sendos al Janine proponon por prezenti la titolon. Ne plu aperos foto en la supera dekstra angulo, sed la stelo kun la vinbero.



- La kursoj en universitato: Ili finiĝis la 12an de aprilo. Estis ok lernantoj, kiuj eble daŭrigos. Povas esti, ke venontjare necesos du niveloj. La 12an de aprilo okazis festeto por la lasta kurso, kun pluraj aranĝoj: prezento de la vivo de Zamenhof, prezento de la filmo *Esperanto*; Morine kantis kelkajn kantojn en Esperanto, kaj unu KD estis vendita. La pikniko en la universitato daŭris ĝis la 9a vespere. Elvezio sendis raporteton, kaj Morine sendos fotojn. Estis planita ekspozicio, sed ĝi ne povis esti organizata, pro tempomanko.

- Estas sekur-veŝtoj kun teksto en Esperanto sur la dorso (EDE), aĉetebblaj ĉe Pierre Dieumegard.

- Lundo la 12an de junio estos inventario kaj katalogigo de la materialo de niaj ŝrankoj en Cenon, ekde la mateno.

Claudine demandas, ĉu eblus havi ŝrankon en la universitato, por meti la librojn donacitajn de Michel Lavergne.

- Les T-shirts Espéranto-Gironde: **Morine** s'est renseignée, mais le logo n'a pas une définition suffisante pour l'inscription. Marcelo va envoyer le dessin à Nils pour qu'il le vectorise.

- **Marcelo**: Pri la turneo de Kajto: Ni rezignis venigi ilin ĉijare. Kompense, ni petis, ke ili venu venontjare. Ili elektis veni speciale por ni de la 2a ĝis la 5a de majo 2018. Ili povus koncerti en Cambes. Marcelo sendis la informon al la salono Simone Signoret en Cenon, kaj atendas la respondon. La prezo estas favora: 1200€, kaj Espéranto-Gironde zorgas pri la organizado. Marcelo proponis ankaŭ, ke, la semajnon antaŭ ilia veno, oni projekciu la filmon *Esperanto*.

Samteme, Marcelo kaj Claudine ĉeestis antaŭ du tagoj prezentadon de libro freŝe eldonita de Dany Dutheil, eldonistino, filino de Michel, kaj spektaklon de kantistino kaj gitaristo en Baron, apud Saint-Germain-du-Puch. La prezento okazis en staplo de vitkulturisto, s-ro Desage.

La vitkulturisto proponas artajn aranĝojn en la staplo, kiu povas akcepti publikon. Li volonte akceptus spektaklon de Kajto.

Finance, se Cenon konsentus doni 1200 eŭrojn, tio estus la tuta sumo postulata de Kajto. Ili devas ripozi post du koncertoj, sed konsentas koncerti dufoje en la sama tago. Eble povus esti en Cambes vendredon vespere, kaj en Cenon sabaton vespere.

Claudine rakontas, ke en 2004, ili intervenis en lernejo de Villenave d'Ornon; ili kantis kaj kantigis la infanojn de iu klaso, prezentis instrumentojn, kaj respondis demandojn de la infanoj, kiuj preparis ekspozicion. Poste ili prezentis koncerton por ducent infanoj. Ili koncertis en Cenon dum la sekvaj tagoj.

- **Elvezio** demandas, ĉu estas novaĵoj, pri la paro, kiu deziras lerni Esperanton.

Claudine: Ili retmesaĝis, sed ne jam venis.

- Pri la poŝtkonto: Oni devas transloki la konton de la poŝtoŭicejo de Carbon-Blanc al tiu de Créon, sed tio estas administracie tre malfacila!

Morine propose de changer de banque: au Crédit Coopératif il n'y a aucun frais de gestion, si on reçoit les relevés par internet.

- **Monique:** Pri la traduklaboro: Ni devas respondi, ĉu ni deziras partopreni aŭ ne.

Claudine: Tio povus esti tasko por la cenona grupo, sed ni jam havas projekton survoje kaj ni ne scias, kiom da tempo necesos por fini ĝin; verŝajne ĝi ne estos finita antaŭ la fino de 2017.

Marcelo timas, ke ĝi estas tre faka, kaj li ne estas fakulo sur tiu kampo.

Monique: Do ni respondos nee.

- Pri Gujan Mestras: Eble ni povos kunveni tie post la ferioj.

Jean-Seb proponas, ke la venonta kunveno okazos ĉe li, en Pessac. Li proponas daton, post diskuto kun Annie.

La datoj por la venonta kunveno estas la 10a aŭ la 17a de septembro. Tiam povos okazi la ĝenerala asembleo.

La kunveno finiĝas je la 12a30.

Post la manĝo, **Morine** proponas spekti filmon de junaj Esperantistoj el Suda Kivuo, Demokratia Respubliko Kongo.

Philippe Stride a reĉu un message en 2011, de Jérémie, en mauvais espéranto. Il l'a corrigé et depuis ils correspondent. Jérémie tenait la permanence du cybercafé du village pour 3€ par jour. Il s'est absenté pour aller en stage d'espéranto et a été mis à la porte. Il a contacté l'association Espéranto Plus, qui l'a aidé financièrement. Jérémie a eu l'idée de raconter son histoire sous forme d'un film en français, avec sous-titres en espéranto. Le film s'intitule *Grâce à la langue* et a été produit par SAT-Amikaro.



Janine



Bildo el la filmo *Grâce à la langue*

ESPERANTO 79 AKCEPTIS LA KOMPANOJ-N EN PARTHENAY de la 25a ĝis la 28a de MAJO 2017

Krom la belega vetero, kiu ĉiam akompanis nin, la akcepto de la organizantoj, Gilles, Anne lia edzino, kaj Monique, estis varma, atentema, efika. Por nia komforto la skipo preparis por ni la manĝaĵojn de la tuta renkonto, bongustajn kaj abundajn, sen forgesi la aperitivojn: «Duhomard», el departemento Deux-Sèvres, kun ĝia nekredbla historio, la «Troussepinette» el Vendée. La suno kaj la varmo ebligis eksterajn manĝojn ombre de arboj aŭ sub antaŭtegmento.

La rendezuo okazis en «La Martinière », (ĉu domo de Martin?), malnova farmdomo aĉetita en 1976 de la asocio Natur-Amikoj kaj renovigita kaj aranĝita de naturamikaj bonvolemuloj.

Por tiu okazo, Monique, naturamika esperantistino, efike zorgis pri ĝi kaj pri ni dum nia restado, ses kantistinoj tranoktantaj en komuna dormejo, la dormoĉambro de la junulinoj (diris Patricia!).

Niaj tri muzikistoj, Fabrice, Pierre kaj Bernard, sole antaŭlaboris por ke ni, dudeko da kantistoj, estu pretaj por provkanti la repertuaron de la Kompanoj.

Vendredon posttagmeze, post vizito de la malnova urbo gvidata de Gilles, ni kantante vagis tra la stratoj de Parthenay. Kelkaj spektantoj zumkantis, eĉ sekvis nin tra la stratoj ĝis la magazeno Super U, kie ni kantis ekstere kaj interne. Gilles kaj Morine disdonis folietojn, sur kiuj kuŝis refrenoj de kelkaj kantoj, parolante pri Esperanto al tiuj, kiuj bonvolis atente aŭskulti.



La malnova urbo

Plejofte ili estis bone akceptitaj, eĉ du adoleskantoj petis la kanzonon *La irlanda balado*, kiun ili kantis kun ni... Sed mi devas diri, ke antaŭ la kafejoj ni vekis neniun atenton, nek scivolon.

Kunkantado sur la placo



Aperitivo Duhomard, kiu ŝuldas sian nomon, al tio, ke iam la kreonto de tiu bongustega vino tute neatendite trovis omaron en apuda rojo!



Sabaton matene Monique kondukis kelkajn piedirantojn tra padoj en arbaro de Secondigny.

Kaj vespere okazis la koncerto. Alia ĥoruso estis antaŭvidita por kanti kun ni, sed bedaŭrinde ili rezignis. Do nur la Kompanoj koncertis antaŭ publiko de deko da ricevemaj spektantoj: Pierre kun siaj propraj kantoj, Famo kun la kantoj de Jacques Brel, kaj ĉiuj kun la komuna repertuaro. Laŭ ĉies opinioj estis bela, agrabla, sukcesplena vespero. Fine, ĉiuj, spektantoj, muzikistoj, kantistoj, kuniĝis ĉirkaŭ boteloj kaj kuketoj.



Pierre, FaMo kaj Bernard

Dimanĉon, post la lasta komuna manĝo, la famaj fazeoloj «mogettes» el Vendée, kelkaj plilongigis la feston per barko-promenado tra la piktaviaj marĉoj, dum la aliaj adiaŭis kaj foriris. Persone mi forte ĝuis tiun parentezan momenton en amika etoso, kun la sento aparteni al korriĉa medio.

Monique



La kantistaro



ORDIGO DE LA ŜRANKOJ EN CENONO



La spuroj de jardekoj da Esperanto!...

Pluraj kuraĝuloj venis en Cenonon, lundon la 12an de junio, por malplenigi la ŝrankojn de Espéranto-Gironde, kaj ordigi, kontroli ktp. la diversajn dokumentojn. Dankon kaj gratulojn al ili pro tiu malfacila laboro!

RAKONTO EL LA MONTENDRA GRUPO IUN TAGON KUN NIAJ SIRIAJ GEAMIKOJ

Pasintan jaron, en marto, nia urbeto Montendre akceptis tri familiojn de siriaj rifuĝintoj. La gepatroj estas junaj: ĉiu paro havas du aŭ tri gefilojn, de unu- ĝis naŭ-jaraĝaj. Kiam asocio de la sociala centro de Montendre parolis pri instruado de la franca por helpi la sirianojn, mi kaj Michel projektis partopreni kiel bonvoluloj.

Tio estas por ni belega kaj fruktodona spertaĵo. Ili havas grandan deziron lerni por pli bone integriĝi en nia mondo, kaj ni havas grandan plezuron re trovi ilin ĉiun ĵaudon (alia grupo da bonvoluloj laboras kun ili ĉiun mardon).



Atentemaj lernantinoj dum la ĵaŭda kurso pri franca lingvo

Alia spertaĵo kun niaj siriaj geamikoj okazis la 18an de marto.

Tiun sabaton, ni veturis al Bordojo kun Véronique, Angéline kaj iliaj amikinoj: entute ni estis sep en la minibuso de LAMaison Pop' (Sociala Centro). Sekvis nin la tri aŭtoj de la tri siriaj familioj. Ni lasis la veturilojn por atingi la tramhaltejon. Vera ekspedicio! Imagu: dudeko da homoj vice paŝantaj sur la trotuaroj (dek kvar plenkreskuloj kaj ok geknaboj, unu rulseĝo kaj du sidĉaretaj!).

Finfine ni atingis la muzeon, kie atendis nin belega ekspozicio. La temo estis «Sirio, mia amo». Ni eniris grandan salonon: sur la muroj oni povis admiri pentraĵojn de du siriaj pentristoj (Fahed Shoshara kaj Hazar Bakbachi). Mi ege ŝatis akvarelaĵojn. Kelkaj montris kortuŝajn vizaĝojn de infanoj, sur alia oni vidis knabeton sidantan sur pakaĵo: lia kliniĝanta dorso, lia mallecita kapo diras la malfeliĉon kaj la solecon. Li atendas... li atendas... eble siajn gepatrojn, eble la momenton por forkuri kaj eskapi el la milito. Sur alia muro, estis kontestaj desegnaĵoj de la gazet-desegnisto Juan Zero-Syrian.

Sur iu desegnaĵo, oni vidis kvin aŭ ses soldatojn, kiuj vice kaj virece marŝas kaj tretas kadavrojn. Sur alia, aviadilo ekflugas (por fuĝi for de Sirio); ĝia vosto, aliformiĝinta al granda mano, etendiĝas al alia mano, kiu restas sur la siria lando.

En la siria salono, oni proponis al ni teon kaj kuketojn, dum ni povis rigardi ekspozicion pri siria metiarto: skatolojn el ligno-mozaiko, malgrandajn objektojn el bronzo (tekruĉojn, tasojn, tranĉilingojn), sapon el Alepo kaj strangajn vegetalajn sponĝojn.

Je la 16a, ni iris al la aŭditorio, kie ni rigardis dokumentfilmon de Antoine Vitkine: *Bachar, mi aŭ la ĥaoso*. En tiu filmo, ni sekvis la vivon de Bachar El Assad ekde kiam li sukcedis je sia patro ĝis nun. Ni vidis, kiamaniere li, de timema junulo, iom post iom fariĝis terura tirano.

Poster for an exhibition at the Musée d'Aquitaine titled "Syrie, mon amour" (Syria, my love). The poster features a stylized map of Syria in blue and green, with the title in French and Arabic. It lists various activities: RENCONTRE, EXPOSITION, DESSIN DE PRESSE, SALON SYRIEN, ARTISANAT, PROJECTION, DANSE, THÉÂTRE, and MUSIQUE. The event is on Saturday, March 18th, from 14h to 20h, and is free of charge. Contact information for ALIPS is provided at the bottom.

Finfine, por pli ĝoje fini la tagon, ni ĉeestis agrablan spektaklon: unue, rigardante du dancistinojn de moderna siria danco, kaj due, aŭskultante muzikistojn: Hareth Mhedi ludis liuton kaj kantis, Bashar Zein akompanis lin per man-tamburo.

Kiam ni foriris, noktiĝis. Ni revenis hejmen iom lacaj sed feliĉaj.

Eble interesus vin scii pri la reagoj de niaj siriaj geamikoj dum tiu tago, precipe dum la filmprezentado. Unue mi diros, ke du el la junulinoj ne volis eniri en la aŭditorion por rigardi la filmon. Tio estus por ili neeltenebla spektaklo. Cetere mi rakontos pri la reago de Emad, unu el la tri junaj viroj: li sidis apud Michel; kiam la filmo montris malliberulojn elirantajn el iuspeca bunkro, Emad premis la brakon de Michel kaj diris: «Ankaŭ mi estis en simila bunkro; oni ligis miajn manojn kaj piedojn; oni min frapis, oni min brulvundis...». Neniam antaŭe li parolis al ni pri tio. Dank'al filmo, li finfine povis paroli... Kaj Michel, siavice, ne plu kapablis respondi: lia premita gorgo malebligis al la vortoj elbuŝiĝi! Li nur povis premi la brakon de Emad...

Christiane



SALVIO

« Kiu salvion havas en sia ĝardeno, tiu kuraciston ne bezonas. »

« Kultata de miloj da jaroj, salvio estas unu el la plej efikaj antimikrobaj kuraciloj kontraŭ malvarmumo, gripo, gorĝdoloro aŭ spirsistema infektado. Ĝi estas elstara digestigilo, kaj amara tonusaltigilo por la hepato. Salvio faciligas digeston kaj sorbadon de nutraj elementoj.

Salvia tizano estas bona urinigilo, kiu helpas organismon sin liberigi de siaj toksinoj. Sekve ĝi estas utila en la kuracado de artrito kaj podagro.

Inhalado: Salvio kuracas spirsistemajn kaj ORL-ajn perturbojn.

Infuzado: Ĝi mildigas ventro-dolorojn, meteorismon kaj menstruajn dolorojn. Ĝi efikas ankaŭ kontraŭ varmeksentoj dum menopaŭzo, ĉar ĝi entenas plant-oestrogenojn, kiuj kompensus la malpliigon de la naturaj hormonoj. Por ĝui ĝiajn bonfarajn efikojn, infuzu unu kafkulerplenon dum 15 minutoj en 15 cl da boletanta akvo (po 20g litre)

Kuirado: Salvio rave parfumas pladojn, aparte tiujn enhavantajn grasan viandon, kia porkaĵo, kaj helpas digestadon.

Morine



Post bongusta porkaĵo,
digestefika tizano!

MALRAPIDA ELVEKIĜO

Cit! En silento konservi la okulojn fermitaj. Iomete plu. Ja vekigi sed malrapide. Post tiel longa nokto kaj tiel profunda dormo, kia delico rekonscii unue pri si mem, pri funkcioj de ĉiuj siaj organoj kaj unue pri la esenca, la koro, kiu jam akcelas siajn batojn. Ni sentas tion. Kaj la pulmoj, kiuj de aero lude ŝveliĝas kaj lasas bruston malŝveliĝi. Tiam alvenas la momento por komenci testi ĉiun el siaj membroj, el siaj fingroj, kiujn ni pacience ekmovetos unu post la aliaj ĝis fina streĉado de ĉiu kaj de la tuto, kvazaŭ por kontroli, ĉu ĉiuj plu pretas ekfunkcii. Nur kiam la tuta korpo pretas, ni malfermu la palpebrojn. Tamen senmove. Escepte eble nur iom la kapo. Necesas iel percepti nian ĉirkaŭon.



Komforta estas nia rifuĝejo. Nu la ĉambroj nek tre vastaj, nek tro altaj, konvenas al ni. Kaj ĝi estas sufiĉe granda, ĉar la tuta familio helpis lastan someron por instalado de nova ĉambro kun aparta ko-

ridor kaj ekstera aliro. Ja bezonata por la nova generacio! Sed plej luksa restas nia teraso el ŝtonoj. Alsune orientita super savoja lago rigarde al plej altaj Alpaj pintoj. Multaj enias nian loĝejon, kreu min! Kvankam nia dormoĉambro povas aspekti iel malvasta. Pruvo estas, ke dum mi kuŝas borde de la lito ĉe la muro, mi sentas, ke mia kunulino buligite alpremiĝis kontraŭ mia flanko. Kompreneble pro tio estas mi la unua ravito, ĉar krom la konsekvenca plezuro jen la plej oportuna remparo kontraŭ atako de vintra frosto. Kaj verdire hodiaŭ matene ja malvarmas.

Turninte la kapon iom maldekstren, mi vidas, ke tiun senton partigas la tuta familio, kiu ne hezitis veni samloken. Ses uloj tiel kundormas. Intermikseco scias foje valorigi siajn avantaĝojn. Male intergeneracieco povas generi ankaŭ malagrablaĵojn. Mi memoras pri surpriza fajfado, kiun dumnokte laŭtigis la Oldulo, - tiel mi kromnomas nian plejaĝulon, patro de mia dulcineo, - kiun mi divenas ĉe la alia ekstremo de la lito. Kia subita ĥaoŝo en la kuŝloko! Ŝoke vekitaj, ĉiuj ni senorde celadis nur forfuĝi antaŭ ol ekkonscii, ke

temis pri denova trompo de la maljunulo, kiu jam senila ne plu tute mense sanas. Tiam mi ne povis silentigi severajn riproĉojn. Sed lia respondo vipe siblis: se li fajfis, kulpis mi!?! Li fajfis, ĉar mi tro laŭte ronkadis! Ve! Kia aplombo veninte de iu, kiu endanĝerigis sian tutan familion per risko de tro brutala veko! Kaj se koro de iu el ni ne eltenus? Nia familio ja ne tro fortas en tiuj kondiĉoj.

Sed momente ŝajnas, ke nur mi jam vekigis. Mi do rajtas ankoraŭ iom plu reve vagadi antaŭ ol entute eltiri min de torporo. Miaj pensoj jam flugas eksteren al tiu belega supra valetto, kiun superas pado por montmigrantoj. Mi nepre reavertu la junulojn, ke ili malfidu piedmigrantojn. Luj proponas ajnajn manĝaĵojn. Okazis, ke nia etulo, frandema kaj scivolema, englutis mine-scias-kion el industria blua ladskatolo. Sekve li estis malsana dum tuta semajno. Ventrodoloroj kaj lakso. Kvazaŭ ne sufiĉus ĉio, kio kreskas ĉirkaŭ nia hejmo! Ĉio nature. Multe pli fidinde por nia sano! Aliaj pafadas nin per siaj fotaparato(eg)oj, pretekste ke ni estas aŭtentaj praloĝantoj. Kia senĝeno! Ĉu ili lasus sin tiel fotadi? Kaj ni scias ilin pretaj eĉ penetri nian travintrejon, se ili kapablas. Sed ĉu ili lasus iun ajn eniri ilian domon, nur ĉar ĝi ne similas al la altaj kokinejoj aŭ kuniklejoj en iliaj modernaj loĝblokoj? Fi, do!...

Jen mi jam sufiĉe ekscitita. Venis tempo eliri por sin skui ekstere. Mi provos ne ĝeni tiujn, kiuj plu dormadas, por lasi al ili la necesan tempon por bone vekigi. Siavice ili ĝuu tiun unikan momenton, per kiu nin regalas malrapida elvekiĝo.

Tiu plezura gusto de l' vekigo similas revenon al la vivo!

Paĉjo Marmoto

(p.k.k. Marcelo, en aŭgusto 2016)



BILDSTRIO

MIAJ KOMENCOJ EN ESPERANTO

Aŭtorino: Irène Rodriguez, filino de Aŭrora

Miaj komencoj en esperanto...



(*) GLAT : GEJOJ, LESBANINOJ, AMBAŬSEKSEMULOJ KAJ TRANSGENRULOJ

NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono B111, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



Kiel Renardo ne sukcesis obteni de Paruino pacokison

Renardo ekkonsoliĝis pri mistraktoj de Klarkant' kaj Tielcelo, kiam li ekvidis sur branĉo de maljuna kverko Paruinion, kiu estas demetinta sian kovitaron en la trunkon de la arbo. Li la unua salutis ŝin.

- Mi trafe alvenas, baptanino mia, malsupren flugu, mi petas: mi atendas de vi pacokison, kaj mi promesis, ke vi ne rifuzos ĝin.

- Ĉu al vi, Renardo? diras Paruino. Mi konsentus, se vi ne estus tia, se oni ne konus viajn trompojn kaj trukojn. Sed, unue, mi ne estas baptanino via: tamen, vi tiel nomas min por ne ŝanĝi vian kutimon ne vortumi veron.

- Kiel malmulte bonkora vi estas, respondas Renardo, via filo estas ja mia baptofilo per la graco de la sankta bapto, kaj mi neniam agis tiel, ke mi malplaĉis al vi. Eĉ se mi tiel agus, mi ne elektus tagon kiel hodiaŭ por remisagi. Aŭskultu, Siro Nobel', nia reĝo, ĵus proklamis ĝeneralan pacon, plaĉu al Dio, ke ĝi longe daŭru. Ĉiuj baronoj ĵuris ĝin, ĉiuj promesis forgesi antaŭajn kverelaĵojn. Tial ĝojas la negravuloj, pasis for la tempo de disputoj, akuzoj, murdoj, ĉiu amos sian najbaron, kaj ĉiu povos trankvile dormi.

- Ĉu vi scias, Mastro Renardo, ke vi tiel diras plaĉajn sentencojn? Mi bonvolas duone kredi ilin; sed aliloke serĉu iun, kiu kisos vin; ne mi donos tiun ekzemplon.

- Vere, baptanino, vi tro malfidas, mi konsolus min pri tio se mi ne ĵurus obteni pacokison de vi kiel de ĉiuj aliaj. Jen mi fermos la okulojn dum vi alflugos kisi min.

- Se tiel, mi bonvolas, diras Paruino. Nu, viaj okuloj: ĉu ili estas reale fermitaj?

- Jes.

- Mi alflugas.

Sed la birdino jam provizis siajn ungojn per floketo el musko, kiun ŝi metis sur la lipharojn de Renardo. Apenaŭ li sentis la altuŝon, li eksaltas por kapti Paruinion, sed ne ŝin li kaptis, pro tio li povis nur honti.

- Ve, jen do via paco, via kiso! Ne vi decidus ke la traktato estu jam rompita.

- He, diras Renardo, ĉu vi ne komprenas, ke mi ŝercas? Mi deziris scii, ĉu vi estas timema. Ek, ni rekomencu. Jen mi, la okulojn fermitajn.

Paruino, kiun la ludo ekamuzis, flugetas kaj saltetas, sed singarde. Renardo duafoje montras la dentojn.

- Sciu, ŝi diras, vi ne sukcesos, mi ĵetus min prefere en fajron ol en viajn brakojn.

- Dio mia, diras Renardo, kial vi tiel tremas je ajna movo? Vi daŭre supozas kaŝitan insidon; tio validis antaŭ la ĵurita paco. Ek, trian fojon. La ĝusta nombro honore al Sankta Trinito. Mi ripetas al vi: mi promesis doni al vi pacokison. Mi devas tion fari, almenaŭ por mia baptofileto, kiun mi aŭdas kanti en la apuda arbo.

Renardo, sendube, belparolas, sed Paruino ŝajnigas ne aŭdi kaj ne formovas el la branĉo de la kverko. Dume jen hundoĉasistoj kaj ŝtelĉasistoj, la hundoj kaj la selitaj ĉevaloj de mastro Abato. Aŭdiĝas sono de trumpoj kaj kornoj, kaj, subite: «La Vulpo! la Vulpo!». Renardo, je tiu terura krio, forgesas Paruinion, premas la voston inter la kruroj por malfaciligi mordon de la leporhundoj. Kaj tiam Paruino mokdiras:


- Renardo, kial foriri? Ĉu la paco ne estas ĵurita?

- Ĵurita, jes, respondas Renardo, sed ne publikigita. Eble tiuj junaj hundoj ankoraŭ ne scias, ke iliaj patroj ĝin dekretis.

- Restadu, mi petas. Mi alflugas por kisi vin.

- Ne, tempo mankas, kaj miaj aferoj urĝas.

FINO



Desegnita de Morin'



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Morine STRIDE**
17 rue Voltaire
33670 CREON
Tel: 06 10 07 08 58 / morinestride@gmail.com

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

